

Interna noto por HALEanoj:

Estimataj anoj de
HALE:

Kvankam nia
statuto postulas,
que ne pagantoj de



Kajeroj el la Sudo

Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

la kotizo estu eksigitaj de la socio, tio ankoraŭ ne okazis, kaj se oni levigas la temon, mi certe defendos kaj voĉdonos, por ke tio ne okazu.

Tamen, mono ne falas el ĉielo, kaj oni bezonas minimume 50 eŭrojn por printi kaj dissendi ĉiun numeron de niu bulteno. Se oni ne pagas la kotizon, la bultenon ne nepre ĉesos aperi, sed kompreneble ne surparpere povos aperi. Oni ne ricevos la bultenon fizike, sed ĝi daŭre aperos en interreto, dum mi ankoraŭ havos monon por pagi ĉi tiun retejon, aŭ mi sukcesos havi senpagan.

Tial baldaŭ aperos ĉi tie la **numeron de decembro de 2009**, sed ne surpapore, ĝis kiam oni pagos kotizon. Se nur unu homo pagas kotizon (€10), nur unu homo ricevos surpaperan version ĉe lia aŭ ŝia domo dum unu jaro. Se du mil homoj pagas kotizon, du mil homojn ricevos ĝin surpapore. Tio dependas nur el vi, anoj aŭ legantoj de **Kajeroj el la Sudo**. Mi fakte prifajfas ĉu vi pagas, ĉu vi ne pagas. Mi ade agos same: mi prezentos ĉiun monatotron antaŭ la esperantistaro hispana kaj monda per nova numero de nia kara magazino, kaj ĉu ekzistas surpaperan version, ĉu ne, mi havos tiun mian ĉe mi, kaj mi ade

laboros per Esperanto per mia humila ilo, nia magazino, kun aŭ sen kolaboracioj de aliaj homoj. Kompreneble, mi preferos ne fari tion sola, sed pli bone sola ol sen ***Kajeroj el la Sudo***.

Dume, mi deziras al vi ĉiuj, karaj legantoj, bona kaj fruktodona agado je la nivelo de kapabloj viaj,

Jesuo

P/s.-Mi lasas ĉi tiun muzikan juvelon, komponita de mi mem sur popola melodio, kiel omaĝon al estontaj datrevenoj de nia kara magazino.

Kajeroj ~ *Gazetoteko*